

# Aĉuloj, Vi

## Enhavo



150 demand-kartoj  
9 magnetaj nomŝildoj  
9 paroj de magnetoj  
81 respond-kartoj  
10 kartoj *Mi certas!*

## Prepari la ludon

La ludo estas por inter 3 kaj 9 ludantoj. La celo estas gajni 7 poentojn antaŭ la aliaj ludantoj. Ridi, plori, krii, kaj aĉuli estas ne nur akcepteblaj, sed estas integra parto de la ludo.

Ĉiu ludanto prenu hazarde elektitan nomŝildon kaj kunligu ĝin al siaj vestaĵoj per la magnetoj.

Ĉiu ludanto prenu stakon de 9 *respond-kartoj* kune kun 1 karto "*Mi certas!*". Se estas malpli ol 9 ludantoj, vi povas formeti la *respond-kartojn* korespondantajn al la neuzataj nomŝildoj.

## Kiel ludi

La lasta homo, kiu alvenis ĉe la grupo komence prenas la rolon de Leganto. Ri prenas kaj laŭtlegas la unuan karton de sur la stako de *demand-kartoj*.

La Leganto nun silente donas sian respondon al la demando, metante unu el la *respond-kartoj* en sia mano kaŝe sur la tablon. La Leganto *ne* rajtas proponi sin mem kiel respondon.

Post kiam la Leganto respondis, ĉiuj aliaj ludantoj simile donas sian respondon, kaŝe metante *respond-karton* sur la tablon antaŭ si. La celo de ĉiu ludrondo estas doni la saman respondon kiel la Leganto, ne nepre tiu, kiun vi mem elektus.

Kiam ĉiuj respondis, la ludantoj malkaŝas siajn respondojn *unu post la alia*, komence kun tiu maldekstre de la Leganto. Tiel, la Leganto estas la lasta, kiu malkaŝas sian karton.

Notu la poentojn, kaj faru novan ludrondon. La sekva homo en la rondo iĝas la Leganto.

## Poentoj

1 poenton gajnas ĉiu ludanto, kiu donis la saman respondon kiel la Leganto. Se la Leganto donas respondon malsaman al ĉiuj aliaj ludantoj, tiam ĉiuj, kiuj donis la plej popularan respondon, gajnas poenton. Ĉiuokaze, oni neniam gajnas poenton dum oni rolas kiel la Leganto.

Apud via *respond-karto* vi povas meti ankaŭ vian karton "*Mi certas!*" Se vi prave elektas la saman homon kiel la Leganto, vi tiam gajnas 2 poentojn. Sed se vi erare uzas ĝin, vi perdas ĝin por la cetero de la ludo.

Se vi ankoraŭ ne komprenis, donu la instrukciojn al iu pli lerta ol vi.